

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UCSD

vendredon, la 8-an de Julio, 2011 • numero ses

Venontaj eventoj

Vendredo (hodiaŭ)

★ 9:00 atm - 12:30 ptm:
Lecionoj



★ 2:00 - 5:00 ptm: Ekskurso
al la akvario Birch.
Kunvenu ĉe nia kutima loko, antaŭ la
loĝejoj.

★ 7:00 - 8:30 ptm: Vespera programo:
Prezento de Alibek DANYALOV

Sabato (morgaŭ)

★ 9:00 atm - 11:30 atm: Lecionoj

★ 2:00 - 4:00 ptm: Posttagmeza umado
Johano ludos podkaston por ni en la
komuna ĉambro, kaj poste ni spektos
la novan filmon *Atako de la lunaj zombioj*.

★ 7:00 - 9:00 ptm: Adiaŭa festeto
(en la komuna ĉambro)

Ne forgesu...

Se vi pruntis librojn de la
NASKa biblioteketo, nepre
remetu ilin sur la librobret-
ton en Cuzco 117 antaŭ saba-
tio tagmeze. Dankon!



La NASKa Fasko

Redaktejo: Cuzco 117
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga informbulteno de
la kursaro. Trovu ĝin matene sur la pordo de
nia komuna ĉambro en Cuzco.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon,
foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-
leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo
en Cuzco 117, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al
<nask.esperanto@gmail.com>.

La evakuado de Kamboĝo

de Filipino DORCAS

Ni ankoraŭ ne estis en la aero. Ni atendis
la lastan membron de la flugteamo. Ni ĉiuj
estis pretaj por ekflugi en nia ŝarĝ-aviadilo,
la fidela C-130 Herkulo*, por unu el la
lastaj niaj elflugoj el Pnom-Peno**, la ĉe-
furbo de Kamboĝo, en 1973. Nia tasko
estis porti la lastajn usonanojn kaj provi-
zojn el la falanta ĉefurbo en evakuada pro-
jekto.

Ni jam sciis ke falos la amikaj reĝimoj.
Ni alproksimiĝis al la fino de la terura mil-
lito en sudorienta azio.

Mankis al ni nur la ŝarĝisto. Li jam ŝarĝis
la veturilon, kaj ni pretis por la flugo al
Tajlando ĉe la fino de longa tago. Sed kie li
estis? Mi, la navigisto, petis al la fluginĝe-
niero malantaŭeniĝi por skolti la situacion.
Li revenis portante nebonan novaĵon. Li
ne trovis la junulon.

Ni aŭdis la bombojn de la komunista
armeo. Ilia vojo el Pnom-Peno estis nun
iom pli facila sen niaj soldatoj por gardi la
urbon. La komunista armeo pli kaj pli
alproksimiĝis al la urbo, al ni. Kelkfoje
okazis paŭzoj en la eksplodado, sed post
nur kelkaj minutoj la teruraj sonoj denove
ekaŭdeblis, pli kaj pli laŭte, pli kaj pli prok-
sime. La piloto malfermis la fenestron
dum ni atendis, por aŭskulti la bombojn
pli klare, sed refoje fermis ĝin, por haltigi
la ĝenan sonon de la haosa milito.

Kie li estis? Kie estis nia ŝarĝisto? Ĉu la
ŝarĝo vere estis bone fiksita per la ĉenoj?
Ŝajnis al ni, ke io jam okazis al li, ĉar li
malaperis. Eble ni kontrolu la ŝarĝon por
certigi ke ĝi ne skuiĝos dum la flugo. Ni ne
volis esti en aviadilo meze de milito kun
peza, nefiksita ŝarĝo en nia malantaŭo.

La kelkaj pasaĝeroj sidis kaj atendis kun
la sama frustrigo, la sama timo. Kion fari?
Ĉu ni risku la flugon sen rigardi la eki-
paĵon? Ĉu ni uzu tempon por kontroli
ĉion? Urĝis la decido. Ŝajnis ke la malaper-
inta ŝarĝisto jam faris ĉion, sed ni ne certis.

Ni pli kaj pli timis la bombojn. Neniu

kuraĝis paroli. Ni ĉiuj konis la pezan,
urĝan defion, kiun la piloto alfrontis. Li
devis decidi ĉu atendi, ĉu fari ion pri la
ŝarĝo, aŭ ĉu ekflugi tujtuj por eskapi sen la
ŝarĝisto.

Iu kriis tra la komunika sistema "Ho...
jen. Li venas! Li kuras ĉi tien kun sakoj en
la manoj."

Li alvenis, senspire, kaj surmetis la kap-
aŭskultilon. La piloto kriis tra la sistemo.
"Kio okazis? Kie vi estis? Ĉu vi havas prob-
lemon? Ĉu vi fartas bone? Kion vi faris?
Ni jam estis pretaj, kaj la malamikoj venas
nun!"

"Nu... Mi butikumis. Vi ne povas imagi!
Vi ne povas kredi la prezojn en la vendejoj.
Mi informis ilin, ke mi estis ilia lasta kli-
ento de Usono. Ili vendis ĉion kontraŭ
bagatela prezo! Rigardu ĉion, kion mi ha-
vas!"

Ne haveblis tiam sufiĉe da tempo por tiu
diskuto. Ni bone sciis kion fari. Ni rapide
fermis la pordojn, startigis la motorojn, kaj
kluĉis la tirhelicojn. Mi donis la instruk-
cion al la piloto, kaj ni grimpigis la aviad-
ilon al sekura alteco. Ni flugis al Korato,
nia bazo, nia hejmo, sen plua problemo.

Ni ĉiuj (krom la ŝarĝinto) havis la saman
penson. "Kio estas liaj prioritatoj?"

Nun, en 2011, mi havas aliajn celojn. Mi
ne plu militas. Mi malmilitas. Mi pacas.
Mi nun estas paca batalanto.

(Verkita la 4-an de julio, 2011)

* La C-130 jam de preskaŭ sesdek jaroj
estas la plej fidela milita ŝarĝaviadilo en la
mondo. Ĝi portas provizojn, pasaĝerojn,
veturilojn, helikopterojn, kuracistojn,
flegistinojn, paraŝutistojn, benzinon,
bombojn, kaj alispacajn ŝarĝojn.

** Ni neniam dum la milito uzis la veran
nomon de la urbo Pnom-Peno (angle
Phnom Penh). La kodnomo estis *kanalo
okdek kvin*.

Letero

Kalumnioj! Mi estis tre malfeliĉa legi la NASKan Faskon de la 7-a de julio. Unu artikolo de la tiel nomita “Ŝafino” misrakontis la malaperon de Birke. En tiu artikolo, la “Ŝafino” sugestis ke mi perdis Birken intence. Tio estas mensogo! Pli malbone, tio estas kalumnio kiu celas ruinigi mian reputacion. Terure! Mi bezonas respondi.

Komence, mi volas rakonti la veran historion. Ni promenis sur la Nigra Plaĝo kiam Birke decidis iri hejmen sola. Hoss nomis min la “gvidanto” kaj mi avertis ŝin ke la vojo estas komplika sed ŝi persistis iri. Mi provis doni al ŝi la bonajn direktojn – sekvu la serpentuman vojon, ĉe la pordo turniĝu dekstren, post unu kurbo turniĝu maldekstren kaj sekvu la vojeton ĝis la granda vojo preter la universitato. Vere, mi maltrankviliĝis. Almenaŭ Javier iris kun Birke, do ŝi ne estis sola. Kiam ni revenis al la manĝejo, mi demandis al la aliaj esperantistoj ĉu ili vidis Birken. Ili ne vidis ŝin. Mi demandis ĉu oni havis ŝian poŝtelefonan numeron. Ni ne havis kaj neniu maltrankviliĝis. Ni decidis atendi iomete antaŭ ol iri serĉi Birken kaj Javieron. Post nelonge, ili revenis vivaj kaj

sanaj sed iomete lacaj ĉar ili perdiĝis kaj devis serĉi la vojon.

Poste, la artikolo ankaŭ implicas internacian komploton kontraŭ Birke organizitan de Javier kaj mi. Mi ne konis Javieron antaŭ NASK. Cetere, Bulgarujo kaj Argentino neniel kontraŭas Germanujon. La spionaj historioj estas pasintaj aferoj.

Fine, ĉu vi pensas ke persono kiu elektis esti dumviva studento volus damaĝisian instruistinojn? Fakte, mi tre ŝatas hejmtaskojn. Kaj mi tre ŝatas Birken.

Bonvolu denunci la malican “Ŝafinon” kiu kalumnias honestajn homojn!

Amike, Ana

Ekssoveta submarŝipo en Sandiego

De Vido GILLET

En 2010, iuj NASKanoj ekskursis ĉe la urbocentro kaj haveno de San Diego. San Diego estas grava haveno, ne nur por fiŝkaptado kaj frajtagado, sed ankaŭ ĝi estas la plej grava usona mararmea haveno. Ekzemple, ni povus vidi, trans la haveno, la nuklean aviadilŝipon *Nimitz*.

La haveno enhavas interesan aron de enireblaj ŝipoj. La plej granda estas la

aviadilŝipo *Midway*. Iam mi ŝatus eniri ĝin, sed laŭ mia sperto tiel aĝaj militŝipoj ne estis konstruitaj, je nekonata kialo, sekve de la Leĝaro pri Usonanoj kun Malkapablecoj – mi timis ke eble mi ne povus elveni!

Alia ŝipo en la haveno estas *Star of India*, la plej aĝa velŝipo flosanta en la tuta mondo. Dum ni proksimiĝis al ĝi, mi subite momente vidis konatan minacan formon en la akvo.

Ekscitita, mi kaptis Hoss-on per brako, kaj diris (kiel, mi kredas, neniu antaŭe en historio de Esperanto) “Aliflanke de ĉi tiu velŝipo estas submarŝipo, kaj laŭ mi ĝi aspektas rus-stila!”

Ŝajnis al mi ke Hoss iom dubis. Kion farus rusa submarŝipo meze de Usona milithaveno? Kion scius kanada komputilisto pri rusaj submarŝipoj? Ĉu iu povus rekonitian je nur momenta ekvido?

Nerve ni promenis ĉe doko, laŭlonge de la velŝipo. Reaperis la submarŝipo, fiere montranta sian grandan ruĝan stelon mulditan en fronto de blokhaŭso.

Estas ja rusa submarŝipo en haveno de San Diego, vendita post la disfalo de Sovetunio por gajni iom da dura mono. Militŝipaj aferoj estas mia dumviva hobbio, kaj mi bone rekonas formojn kaj detalojn.

Kelkaj fotoj de la eksterkursaj programoj

(Multajn dankojn al Ana kaj Ray pro la fotoj!)



Vicky, Kinen kaj Tomaso ĝuas la golfeton La Jolla Cove.



Ni serĉas glisilojn en senglisila ĉielo.



Jen kutima ĥaoso en la komuna ĉambro.

Sekreta lingvo de 1962

De Filipino DORCAS

Antaŭ nelonge mi legis la interesan libron *Peter Jamison's Secret Language* de Sylvan ZAFT. Ĝi estas libro por geknaboj. En tiu romano la geknaboj interesiĝis pri lingvoj. Rezultis, ke ili lernis Esperanton por uzi kiel sekretan lingvon.

Tio memorigis min pri la projekto, kiun mi kaj amikoj faris en la mezlernejo en 1962. Ni volis krei sekretan lingvon. Ni estis en altnivela hispana kurso, sed ĉiam luktis kontraŭ la neregulaj verboj. Ni decidis krei nian propran lingvon – sekretan lingvon, kiun nur ni povus uzi.

Ni decidis, ke nia lingvo havu nur regulajn verbojn. Tamen, ĉiu alia parto de la lingvo estis nekredinde komplika. Ni opiniis, ke lingvoj devas esti komplikaj aferoj.

Ni kreis niajn proprajn literojn el geometriaj figuroj. La gramatiko estis tiel komplika, ke ni ne povis memori la regulojn de unu tago ĝis la venonta. Ni kreis la sencon de la difina artikolo (“la”), sed ne havis apartan vorton por tio. Ni ŝanĝis la formon de la substantivo por esti difina.

La lingvo estis tiel sekreta, ke neniu alia uzis tiun strangajon. Ĝi estis tiel komplika, ke eĉ ni neniam uzis ĝin. Ni ne povis diri eĉ “la hundo estas nigra” pro la komplika gramatiko.

Bedaŭrinde, ni ne aŭdis pri Esperanto en tiuj jaroj. Ni povintus lerni ĝin. Ni povintus lerni simplan, utilan lingvon, anstataŭ krei komplikan, neutilan lingvon.

Esperanto estis kaj estas kiel “sekreta” lingvo en Usono. Ĉu ĝi restos ĉiame kiel sekreta lingvo en Usono?

Piednoto: La libro *Peter Jamison's Secret Language* de Sylvan Zaft estas havebla en la libroservo de Esperanto-USA kaj ankaŭ interrete ĉe:

<http://web.me.com/sylvanzaft>

Tie troveblas ankaŭ la sono de voĉlegado de la unuaj kelkaj ĉapitroj de la libro. Tiu libro estas en la angla lingvo, sed rakontas pri geknaboj, kiuj lernas Esperanton, do, ĝi enkondukas la lingvon al la geknaboj, kiuj legas ĝin.

Fabelo

De Ray REDD

Estis malgranda, malalta insulo, sur kiu loĝis malgranda tribo. La insulanoj vivis feliĉe, ĝis tiam kiam tutmonda plivarmiĝo levis la marnivelon kaj minacis ilian vivon. La tribo petis novan hejmon al diversaj nacioj kaj al la Unuiĝintaj Nacioj. Post multe da diskuto, iu granda, riĉa lando konsentis doni al la insulanoj iun marbordan terpecon kiel novan hejmon. Neregistara organizaĵo

sendis ŝipon por porti la insulanojn kaj iliajn havaĵojn al la nova hejmo. La tribunaj estis malmultaj kaj havis tiel malmultajn posedaĵojn ke tiu unu ŝipo sufiĉis. La ŝipo ankaŭ prenis kelkajn grandajn statuojn de dioj.

Sed estis unu statuo kiu estis tro granda, kaj tro peza por la ŝipo. Malfeliĉe la insulanoj forlasis ĝin. Poste, ili ĝojis pri la nova hejmo sed iom malĝojis pri la perdita statuo. Ili donis al la nova vilaĝo la nomon “Sen Diego.”

Vortangulo

La Nomo de la Besto¹

De Ray REDD

En mia vizito al la bestoĝardeno mi vidis aron de aziaj, senvostaj simiejoj. Ĉar mi ne certis pri la nomo de tiuj bestoj, mi serĉis haveblajn vortarojn. La rezulto estis interesa kazo de malkonsento inter vortaroj.



Laŭ la nuna eldono de PIV, la nomo estas “orangutano”, por kiu la vortaro donas kompletan difinon. Ankaŭ aperas, en aparta artikolo, la vorto “orangutango”, en kiu la radiko havas finan “g”-on. Anstataŭ difino aperas nur “=orangutano”, kaj la surskribo “Z”, indikaĵo ke tiu formo aperas en la verkaro de Zamenhof. Tamen, la redaktoroj de PIV preferas la radikon sen fina “g”.

La redaktoroj de la Reta Vortaro tute malkonsentas. Tie estas artikolo nur pri “orangutango”, kun tiu aldona noto (PV, PIV1, kaj PIV2 estas antaŭaj eldonoj de la PIV):

Rim.: PV indikas nur la Zamenhofan vorton orangutango; ankaŭ PIV1 havas nur tiuvortan artikolon, en kiu ĝi tamen naive rimarkigas, ke pli ĝusta (!) formo estus “orangutano” (la aŭtoroj de PIV ial forgesis, ke ilia vortaro temas ne pri la malaja lingvo, sed pri Esperanto). PIV2 entenas la du formojn en apartaj artikoloj, kun prefero por “orangutano”. En la internacia uzo ambaŭ for-

moj estas proksimume egale distribuitaj, sed la Zamenhofa formo evidente pli oportuna por Esperanto: ĝi evitigas eventualan miskomprenon ke temas pri enloĝanto de iu hipoteza “Oranguto”. [Sergio Pokrovskij]

Eble en la NASKanaro estas iu talentulo pri fikcio. Jen defio: priskribi la landon de Oranguto kaj ties loĝantojn. Eble ili havas interesan kutiman dancan. Eble tie haveblas potenca substanco, “orano”, de kiu nur unu guto sufiĉas por iu celo. Mi lasas tion por alia verkisto.

(1) Bonvolu legi la titolon zorge. Ĉi tiu artikolo temas pri nenia apokalipsa afero.

Ĉu reti?

De Vido GILLET

Mia vera fako estas konekti komputilojn, unu al la alia kaj per iu reto al la Interreto. Do kiel esperantisto, mi multe pripensas fakvortojn kaj iam eble fakvortaron...

Laŭ mia lego de kelkaj indaj vortaroj, “reti” bone signifas “kapti per reto, ekzemple fiŝojn aŭ papilion”. Mi neniam aŭdis pri tia kapto de iu ajn komputilo. Laŭ tio, “reti” tute ne taŭgas kiel fakvorto.

Kiam mi konektas aŭ alligas komputilojn, mi faras komputilaran retpordan. Mi igas ilin retaj.

Do, kiam oni demandas pri mia laboro, mi diras, “Mi retigas kaj sekurigas komputilojn.” Laŭ mi, “retigi” taŭgas multe pli bone ol “reti” en ĉi tiu senco.

Kelkaj utilaj retejoj

Universala Esperanto-Asocio (UEA)	uea.org
Esperanto-USA	esperanto-usa.org
Informoj pri Esperanto en diversaj lingvoj	esperanto.net
Kursoj de Esperanto	lernu.net kurso.com.br esperanto.lodestone.org/novajxoj/kurso
Esperantista junularo	tejo.org
Por instruistoj kaj lernemuloj	edukado.net ikso.net
Libera enciklopedio	eo.wikipedia.org
Literaturo en Esperanto	esperantoland.org/literaturo donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/literaturo.html steloj.de/esperanto/verkoj.html
Vendejoj de libroj kaj aliaj esperantaĵoj	uea.org/katalogo retbutiko.esperanto.be esperanto-usa.org/retbutiko
Muziko	vinilkosmo.com
Esperanto-kulturo kaj arto	artista.ikso.net
Informoj pri Esperanto	informado.net dmoz.org/world/esperanto startu.net esperanto.lodestone.org/ligoj
Pasporta Servo	tejo.org/ps
Vortaroj	la-vortaro.net retavortaro.de/revo vortaro.net vortaro.wikkii.com/vikio
Vetero en Esperanto	esperanto.wunderground.com
Kalendaro de Esperantaj aranĝoj	www.eventoj.hu/kalendar.htm
Radioelsendoj	radioverda.com retradio.posterous.com laondo.rpod.ru members.aon.at/aldone/retradio
Retaj gazetoj	liberafolio.org esperanto.china.org.cn
Por lernantoj	facila.org
Sondosieroj	ipernity.com/doc/69959
Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (PMEGo)	bertilow.com/pmeg
NASK	esperanto.org/nask
Bildstriaĵaj spritaĵoj	multedaridoj.blogspot.com/